Laŭ simila linio kiel mia konsciigo pri kion ni povas oferti al aliaj organizaĵoj, ene de IKRJO ni neformale esploras la eblojn ricevi ĉiujn tiujn organizaĵojn en la venontjara IJK por la ĉiujara renkontiĝo de ĉi tiu platformo, kio krom esti monŝpara kaj vojaĝfaciliga por la diversaj organizaĵoj, estus granda oportuno por montri al multaj tutmondaj junulaj organizaĵoj kiel Esperanto funkcias praktike.

Mi ŝatus per ĉi tiu vojo jam inspiri al ĉiuj landaj kaj lokaj junularaj organizaĵoj esplori pri iliaj homfortoj kaj kapabluloj, kaj vidi kiel ili povas ne simple varbe sed aktive subtene helpi organizaĵojn en ĉies lando kontaktiĝi kun organizaĵoj en aliaj landoj, kaj kune pli bone komuniki kaj dividi spertojn.”

Fonto:

<https://www.tejo.org/fr/>

tejo-partoprenis-eventon-pri-homaj-rajtoj-ce-un-en-genevo/



foto: TEJO

TURNEOJ

Sinteza raporto de Yves Nevelsteen

Dek kvar kluboj kandidatis por akcepti Yves Nevelsteen. Ni ne povis elekti ĉiujn kandidatojn por turneo nur du-semajna. De la 5a ĝis la 19a de novembro 2019, Yves vizitis 9 klubojn laŭ jena itinero: Paris, Périgueux, La-Roche-sur-Yon, Rennes-Montfort, Pleudaniel, Saint-Brieuc, Hérouville, Thionville kaj Strasbourg.

Ĉiuj kluboj tre pozitive raportis pri la intervenoj de Yves Nevelsteen. “Klera preleganto” (Thionville), “Spertulo pri traduko, li bonege klarigas” (Strasbourg), “Lia priesperanta laboro tre impresis nin” (Pleudaniel), “Perfekte” (Paris).

Ĉie la intervenanto kreis agrablan etoson kaj sciis kapti la atenton de la publiko. “Liaj intervenoj tre plaĉis” (La-Roche-sur-Yon), “Ĉiuj multe ŝatis lian tre klaran manieron alparoli la lernantojn” (Périgueux), “Tre interesa kaj agrabla vespero” (Saint-Brieuc), “Ege interese, venis multaj demandoj” (Rennes-Montfort), “La tempo kuris tro rapide!” (Hérouville).

Laŭ la kluboj, Yves intervenis de unu ĝis tri fojoj dum ĉiu-semajna aŭ monata kurso, publika aranĝo, aŭ dum vespermango. Li ankaŭ vizitis du lernejojn: la altlernejon ENSSAT en Lannion kaj liceon Bertran-de-Born en Périgueux, kie Claude Labetaa instruas E-on. Kiel kutime, Thionville kunlaboris kun la asocio “Forum des Citoyens” por publika kunveno en la kultura kafejo de Nilvange “Le Gueulard”.

Lin aŭskultis minimume 150 esperantistoj sed nur 10 ekstermovaduloj ĉeestis publikan kunvenon. Ouest-France kaj Le Télégramme en Pleudaniel aperigis artikolon kun foto kaj ĵurnalisto vizitis la kunvenon en Strasbourg.

La plej ofte pritraktita temo estis *Vivi en lando kun tri oficialaj lingvoj* (Pleudaniel, Périgueux, Rennes-Montfort, Hérouville kaj Thionville) kaj *Ni nun alimaniere vidos Belgion* (Hérouville). Li prezentis ankaŭ la temojn *Oftaj eraroj kaj novaj vortoj* en La-Roche-sur-Yon kaj Strasbourg ; *Retservoj en Pleudaniel* kaj *200 esperantaj marknomoj en Parizo* (kaj trovis novan dum promenado en Caen: “Dentego”).

Por konkludi tiun sintezan raporton, mi elektis kelkajn eltiraĵojn el mesaĝo de Henri Masson okaze de raporto pri la restado de Yves Nevelsteen en Vendée.

Tradukisto de komputilaj programoj, vortaristo, aŭtoro de manlibroj, sendependa eldonisto, scipovanta la nederlandan, la anglan, la germanan kaj la francan aldone al Esperanto, Yves kontribuis al Vikipedio, t.e. la Esperanto-versio de Wikipedia, kaj plue kontribuas diversmaniere per provizo de gvidmaterialo, per kunlaboro en komputil-aj programaroj aŭ pretigo de interfacoj en Esperanto. Ne eblas ĉi tie listigi ĉiujn esperantigitajn liberajn programarojn. Interesatoj povas konsulti tiun liston :

https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_Esperantigitaj_programoj

Apartan intereson havas la retejo Eventa Servo, kiu ebligas anonci Esperanto-eventojn. Eblas ĉiutage scii kiom da eventoj estas ligitaj al Esperanto tra la mondo. Tio inkluzivas kongresojn same kiel simplajn renkontiĝojn, prelegojn aŭ kursojn. En informstando, la mondmapo ebligas montri kio okazas en difinita tago.

Yves eldonas ankaŭ utilajn gvidilojn, ekz. *Eksterrete*, konsultebla ankaŭ... interrete: <http://www.nevelsteen.info/eksterrete> Estas bonŝanco por Esperanto havi tian kompetentulon en fakoj de komputado.

Jes ja, en ĉiu klubo, pri ĉiuj temoj, Yves intervenis profesinivele kaj talente. Ni esperas, ke li onte denove prelegvojaĝos en nia lando por viziti klubojn en aliaj regionoj.

Dankon al vi, Yves kaj ĝis baldaŭ!

Yves Nicolas



Yves prelegas en Hérouville-Saint-Clair

Sinteza raporto de Claude Rouget

26 kluboj kandidatis por akcepti Claude Rouget sed ni povis elekti nur 9 klubojn por tiu trisemajna turneo. De la 20a de novembro ĝis la 10a de decembro, Claude estis akceptita de la kluboj en Orléans, Tours, Angers, Lannion, Vannes, Gironde, Saint Etienne, Lyon kaj Grenoble.

La propra raporto de Claude estas tiom preciza (legu ĝin ĉi-sube), ke mi ne bezonas miavice redoni tiujn informojn. De la kluboj, revenis al mi nur laŭdoj pri la kvalito de la prelegoj kiuj tre plaĉis al la publiko, esperantista aŭ ne. Venis multaj demandoj post ĉiu prelego kiun ilustris bela diaporamo. La temoj pri-traktis la bicikladon de Claude de Norvegio ĝis Portugalio, la vivon, politikon, historion en Norvegio, liajn esperantistajn travivaĵojn.

Ne ĉiuj kluboj sukcesis allogi ne-esperantistan publikon kaj, kiel tro kutime, mankis ĵurnalistaj raportoj. Claude intervenis en la bordoza universitato kaj Saint-Etienne kunlaboris kun la lokaj "Amicale Laïque", "Collectif pour une transition citoyenne" kaj biciklista asocio. Tiaj kunlaboroj efektive povas helpi nin plilarĝigi nian publikon.

Pri organizado

1) Vannes kaj Grenoble ŝatus ricevi pli da informoj antaŭ la turneo, ekzemple por respondi al ĵurnalistoj aŭ por prepari surlo-kajn renkontiĝojn. Respondo: antaŭ ĉiu turneo, la kluboj ricevas la "turnean adresaron", kiu entenas la informojn pri ĉiu klubo sed ankaŭ la retadreson de la prelegonto, do li estas rekte kontaktebla de la kluboj mem por tiaj demandoj. Mi tamen povas priatenti, ke en sia antaŭturnea prezento la prelegonto alportu pli da informoj pri siaj propraj deziroj.

2) Lyon ŝatis, ke la programo ebligis liberan elekton de la datoj inter Lyon kaj Grenoble.

Respondo: jes ja, sed tio povas okazi nur inter sufiĉe proksimaj kluboj.

3) Kelkaj kluboj ne respondis, aŭ malfrue respondis, aŭ nur parte respondis al la postturnea demandilo. Estas domaĝe ĉar ni perdas informojn (feliĉe, ke Claude mem raportis!). Mi devis rekontakti, kelkfoje vane, la mutajn klubojn, konsekvence perdis tempon. Mi opinias, ke tiuj raportoj povas helpi nin progresi sed ili perdas sian intereson se la sintezo atingas la klubojn tro malfrue post la turneo.

Yves NICOLAS

Raporto de Claude

Mi nun finfaris mian turneon kaj revenis al mia fratino hieraŭ vespere. Mi bone kontentas pri la tri lastaj semajnoj kaj vizitoj al kluboj, tieaj prelegoj ktp. Ŝajnas al mi ke la kluboj ankaŭ kontentas pri miaj kontribuoj. Mi deziras ricevi resumon de la raportoj, kiam ĉiuj kluboj skribos al vi. Sukceso de miaj prelegoj, laŭ nombro de aŭskultantoj, tre variis:

- Orléans: ĉ. 12 esperantistoj kaj 1 neesperantistino
- Tours: ĉ. 20 esperantistoj kaj 1-2 neesperantistoj (lingvofestivalo)

- Angers: ĉ. 25 geesperantistoj, inter kiuj Bruno kaj Maryvonne Robineau; neniuj neesperantistoj
- Lannion: ĉ. 20 partoprenantoj, el kiuj pli ol 5 estas ne-esperantistoj (i.a. paro da eks-esperantistoj!)
- Vannes: ĉ. 20 esperantistoj (el kiuj du junuloj) kaj 2-3 neesperantistoj
- Bordeaux: pluraj aranĝoj kun maks. 15 partoprenantoj, sed neniuj neesperantistoj venis
- Saint-Etienne: 7 aŭskultantoj, neniuj esperantistoj krom la organizanto (Pierre)
- Lyon: Esperanto-festo, ĉ. 10 esperantistoj kaj neniuj ne-esperantistoj
- Grenoble: pli ol 40 partoprenantoj, el kiuj eble duono da neesperantistoj

Krom tiuj aranĝoj malfermitaj al neesperantista publiko (plejparte anoncitaj en biciklaj kluboj), mi ankaŭ prelegis por E-klubanoj (en Tours, Bordeaux, Lyon kaj Grenoble). Kaj mi partoprenis kurson por lernejoj en Orléans.

Por mi dupelega serio estis bona solvo: prelegi ekzemple pri Norvegio esperantlingve por klubanoj, kaj la postan tagon franglingve pri mia bicikla vojaĝo kaj mia uzo de Esperanto. Mi kunmetas lastan version de mia prelego (kiun mi uzis en Saint-Étienne, Lyon kaj Grenoble). Eĉ kiam mi prelegis franglingve, mi montris esperantan tekston sur la ekrano. La akcepto de esperantistoj estis senripoĉa. Kelkfoje ili tro ĉiĉeronis, sed eble eksterlandaj gastoj/prelegantoj tion ŝatas. Mi ofte preferas havi tempon por mi mem kaj libere esplori urbojn. Tion mi sukcesis fari en Orléans, Bordeaux kaj Grenoble. En tiu lasta urbo, la prezidantino de la klubo akceptis ŝofori min al diversaj biciklaj riparejoj kun diversaj statusoj, kaj tio estis por mi tre interese. Dankon pro la ebleco pli bone ekkoni Francion. Mi malkovris urbojn, kiujn mi tute ne konis (ekz. Tours, Angers, Vannes kaj Grenoble).

Amike salutas
Claude



Claude Rouget en okcidenta Norvegio (foto: Céline Lalubie)

Paroli lingvon kun akĉento

Eble vi jam havis la okazon konstati, ke dulingvaj infanoj parolas ambaŭ lingvojn nature lernitajn de la patro kaj de la patrino. Aŭ aliaj, pro vivado en alilingva lando, parolas la tiean lingvon sen akĉento (krom eventuale iu loka akĉento).

Alia konstato rimarkeblas ĉe plenkreskuloj, kiuj lernis kroman lingvon post la infanaĝo: tre ofte ili parolas sian nove lernitan lingvon ne tiel flue kaj kun akĉento.

Kial tiu diferenco? Nuntempe sciatas, ke dum la infanaĝo la paroligaj organoj ankoraŭ malrigidas kaj sukcesas sin adapti por eligi novajn sonojn. Ju pli infano maljuniĝas, des pli tiuj internaj paroligiloj malmoliĝas kaj tiam necesas nepra trejnado de la elparolado por atingi ĝustan prononcon. Ankoraŭ pli streĉe devas sin adapti plenkreskuloj.

Ĉu gravas la parolado en fremda lingvo, se oni parolas kun akĉento? Nu: se via akĉento vere fortas kaj ĝenas la denaskulojn ĝis nekomprene, vi nepre klopodu paroli pli ĝuste! Kelkafoje malfacilas sekvi iajn klarigojn aŭ eĉ prelegojn pro la akĉento de la parolanto, eĉ kiam oni kutimas je diversaj akĉentoj.

Se vi parolas fremdan lingvon per nura iometa akĉento, viaj diraĵoj estos tamen komprenataj kaj tiam eĉ povas okazi, ke via

eta akĉento plaĉas al viaj aŭskultantoj. En Germanio, nederlandaj artistoj, kantistoj, muzikistoj, eĉ intence parolas la germanan kun nederlanda akĉento, ĉar ili ege profitas tiun ŝaton de la aŭskultantoj. En Germanio ankaŭ franca akĉento ricevas plej ofte plaĉan akcepton. Ĝi estas ekzemple uzata por reklamaj francajn produktojn.

Male, en Francio, pro la lastaj militoj inter Francio kaj Germanio, la germana akĉento estas ofte malŝatata. Tiun malamon uzis ankaŭ la francaj postmilitaj registaroj en Alzaco kaj en la ĝermanlingva Loreno, por igi la loĝantojn honti pri sia akĉenta parolado de la franca pro la ĉiutaga uzo de ĝermana dialekto. Anstataŭ bone lerni kaj la dialekton kaj la francan, la homoj hontis kaj multaj ne plu parolis la dialekton kun siaj infanoj. La rezulto estis pli da malfacilaĵoj por lerni la akademian germanan. Dume la germanaj najbaraj entreprenoj proponas laborpostenojn en Germanio, sed ne plu trovas lingve kapablajn kandidatojn!

Kion konkludi resume? Ne hezitu lerni kiom eble plej multe da lingvoj, laŭ nivelo kiel eble plej alta, kaj vi ĝuos veran banadon en aliaj kulturoj. Kia plezuro, kiam oni sin sentas hejme en aliaj kultursferoj, kiuj tiam ne plu fremdas!

Edmond LUDWIG



Panneau en langue locale accompagnant le panneau en français à l'entrée d'un village lorrain.
Symbolique, mais ce n'est pas pour autant que revit la langue d'autrefois.

Skandalo en Esperantujo

Zamenhof skribis: “Nenia registaro venos al ni, se ni mem ne imponos per nia forto.”

Pri la nombro de esperantistoj en Francio ni ne scias.

Kelkaj pli-malpli bone parolas Esperanton sen esti membroj de asocioj... kaj ni ne konas la nombron de esperantistoj en la diversaj asocioj – mi nombris sesdek naŭ en nia federacio Hauts-de-France. En Francio (Espéranto-France kaj SAT-Amikaro), mi ne scias. En la aliaj federacioj?

Sed pri la nombro de esperantistoj, kiuj legas librojn kadre de la tutmonda projekto Sumoo, ni scias: 29 homoj en Francio legis en januaro 2020! Inter ili 12 loĝas en Bretonio kaj 8 en urbo Araso, kaj por la cetero estas kelkaj izolitoj perditaj. Unue mi deziras forte gratuli niajn amikojn en Araso, kiuj regule, ĉiun duan monaton, daŭre legas! Sed pri la aliaj esperantistoj en Francio tiu eksterordinare eta nombro de legantoj en Esperantujo levas multajn demandojn. Kie estas la francaj esperantistoj? Kaj kiel zorgas la francaj esperantistoj pri sia lingvo Esperanto? Ĉiu scias, ke regule legi librojn, revuojn estas unu el la plej trafaj manieroj por progresi kaj atingi pli altan nivelon kaj ankaŭ ĝui legadon en nia internacia lingvo. Mi precizigas, ke ekzistas multaj tre bonaj libroj originale verkitaj en Esperanto kaj multaj tradukoj. Se iu eminentulo de la ekstera mondo demandus min pri nia mondo kaj pri nia kultura aktiveco, mi simple hontus. Estas skandalo!

Post Briteliro, kiel pretendi enkondukon de Esperanto en Eŭropan Union, kaj por niaj lernantoj en Francio, en elementaj, meznivelaj lernejoj, kiel pretendi enkondukon de Esperanto en la edukon sistemon kun tiom malmulte da videblaj esperantistoj? Kiel skribis Zamenhof: neni venos al ni, ĉar simple ni estas multe tro malfortaj. Ni ne ekzistas!

Do, por ni mem, por nia scio pri Esperanto, por nia scio pri ĝia kulturo, pri ĝia literaturo, kaj ankaŭ por propagandi en la ekstera mondo, mi petas vin LEGI, eĉ unu aŭ du paĝojn ĉiutage en la Sumoj periodoj (nur maksimume 6 periodoj ĉiujare) kaj eĉ ekster tiuj periodoj.


Por aliĝi al Sumoo estas tre simple: legu la regularon en la retejo de Esperanto-Sumoo kaj sendu mesaĝon al HORI Jasuo por partopreni la sekvan periodon de la 15a ĝis la 29a de marto! Vi havas iom da tempo por aliĝi kaj por elekti libron! Certe estas bonaj libroj en la biblioteko de via klubo aŭ en via propra biblioteko, kiujn vi plezure legos. Kaj se vi ne havas, kontaktu Espéranto-France aŭ SAT-Amikaro por mendi. Kaj estas bitlibroj senpage legeblaj en la retejo de Esperanto-Sumoo. Kaj se vi ne havas retaliron, petu helpon de unu el viaj amikoj por ke li zorgu pri via aliĝo.

Jen la diversaj informeblecoj - la retejo de Sumoo, la retadreso de HORI Jasuo :

<http://www.esperanto-sumoo.pl/regularo.html>

hori-zonto@water.sannet.ne.jp

Jean-Claude ROY



Hori Jasuo kun la listo de Internacia Esperanto-Sumoo partoprenantoj enmane (foto: Vasilkadijeli, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=46795317>)

POEZIO EL ĈIUJ ĈIELOJ por la sesa fojo

Konkurso pri poemoj en Esperanto kaj la itala lingvo, sen partoprenkotizo

Ajna poemtemo estos akceptita.

Estas ankaŭ speciala premio por poemo, kiu temas pri sociala malkomforto kaj ĉia opreso kaj alia speciala premio por la plej bela soneto.

Kiu rajtas partopreni?

Ĉiuj poetoj, el nia planedo.

Lingvoj

La versaĵoj povos alveni en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj.

Kiel partopreni

La poetoj rajtas partopreni per nur unu poeziaĵo ne pli longa ol kvindek versoj entute.

Oni sendu ĝin, kune kun la aliĝilo, per retpoŝto al:

samideano@hotmail.it

Elŝutu la aliĝilon en formato Doc :

https://www.iconcorsidisamideano.it/?media_dl=491

La verkoj devos alveni antaŭ la 30-a de aprilo 2020.

Detaloj ĉe <https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciu-j-cieloj-sesa/>

LITERATURO & MUZIKO

Kolektado de tekstoj – Libroprojekto

Esperanto-Gironde kolektas kanzonojn de Georges Brassens tradukitajn en Esperanto. Grupo da kompetentuloj jam favore respondis al nia praalvoko. Sperta kerno garantias firman bazon por ĝuplena kunlaboro. La nuna listo de la pretigitaj tradukoj atestas jam buntan kolekton. Ĝi riĉas pro la diversaj fontoj, pro la elektitaj temoj, pro la verkojaroj de la originalaĵoj, pro la stiloj. Ĉiu interesato povos facile ricevi tiun liston, ekzemple post simpla perreta peto al la ĉi-suba adreso.

Tiu ĉialvoko petas vian helpon por trovi bonkvalitajn versiojn de kanzonoj, ankoraŭ neenlistigitajn, kiujn vi konsentus sendi al ni.

Antaŭ du monatoj, lanĉante tiun kampanjon, ni nombris 28 tekstojn kaj esperis atingi kvindekon antaŭ junio 2020. La listo hodiaŭ enhavas 58 versiojn de 51 malsamaj titoloj.


Paralele al la tradukokolekto estis lanĉita ankaŭ la projekto pri redaktota libro. Esperanto-Gironde ekdiskutis pri temoj kiel: Ĉu tiu libro Brassens en Esperanto konsistos nur el kanzonoj? Ĉu nur tradukoj aŭ ankaŭ ties originaloj? Ĉu aperu tekstoj prezentantaj la artiston, la kanzonojn? Kiom da paĝoj Kiu formato? Kiom da libroj ni eldonos?

Gravan artistan apogon tiu projekto ricevas dank'al la aktiva partopreno de Blaise Guinin. Novbakita esperantisto, Blaise aŭtoris la franclingvan bildrakonton Georges et la mort 1 en 2011 kaj li konsentas ilustri la libron.

Kunhelpu en la redaktado de tiu presota libro! Sendu viajn tradukojn de Brassens en Esperanto al klodin@esperanto-gironde.fr

Ankaŭ kuraĝigaj, subtenaj vortoj tre bonvenas!

Ni plikonigu Brassens-on per Esperanto! Kaj Esperanton al Brassens-ŝatantoj !



Georges et la mort, eldonejo Glénat:

<https://www.glenat.com/12bis>

[/georges-et-la-mort-9782356483553](https://www.glenat.com/12bis/georges-et-la-mort-9782356483553)

Franclingvaj kritikoj:


[https://www.babelio.com/livres/](https://www.babelio.com/livres/Guinin-Georges-et-la-Mort/317592/critiques)

[Guinin-Georges-et-la-Mort/317592/critiques](https://www.babelio.com/livres/Guinin-Georges-et-la-Mort/317592/critiques)

Kien vi iros?

Bit albumo kunproduktita de Rafael Milhomem - Vinilkosmo © 2020 - aperis la 17an de januaro 2020.

Kien vi iros? estas la nomo de la plej freŝa bita albumo de Rafael Milhomem. Malfacile ĝin difini. Se vi bezonas difinon, ĝi estus “mondmuziko”. Ĝi estas koncepta kaj instrumenta verko kiu do-



nas la ideon, ke oni povas vojaĝi tra la mondo sen moviĝi de sia loko, per la potenco de la menso plibonigita per muziko kaj legado.

La albumo kunportas nin al diversaj lokoj de la mondo: ni vizitos la afrikan kontinenton per la titolo Al Afriko. Ni trapasos Azion per la titoloj Al Ĉinio, Al Barato kaj Al Persujo (nuna Irano). En Eŭropo, ni vizitos Portugalion per la titolo Al Portugalio.

En Sud-Ameriko, ni vojaĝos al Argentino per la muzikaĵo Al Argentino, kaj vizitos la landojn kiujn transiras Andoj per Al Andaj Landoj. Brazilo ricevas specialan atenton, kun apartaj muzikaĵoj dediĉitaj al la nordorienta regiono, la sudorienta regiono kaj la okcidenta centro de Brazilo, kie naskiĝis Milhomem.

Kien vi iros?, la muzikaĵo kiu donas al la albumo sian nomon, estas sennacia, ĝi bone reprezentas la neŭtralecon de Esperanto. Ĝi resumas la tutan albumon, kaj temas pri la homa kapablo moviĝi aliloke per muziko kaj legado.

La albumo enhavas ankaŭ la faman muzikaĵon Hejmo, kun teksto de la poeto Marjorie Boulton kaj muziko de Rafael Milhomem. Ĝi alvokas sufiĉe densan kaj katastrofan etoson kaj kongruas perfekte kun la peza metala atmosfero.

Kiel ni rimarkis, multaj landoj restis eks-tere, ĉar la mondo estas tiom granda! Sed ne maltrankviliĝu, ĉar ni jam pensis pri la dua volumo!

(fonto: Vinilkosmo)

Ek al la triagrada ekzameno!

Ekde 2008 ekzistas Esperanto-ekzamenoj laŭ KER-sistemo por 3 niveloj (B1, B2, C1) el la 6 ekzistantaj. La KER-ekzamenoj taksas la kapablojn uzi la lingvon.

La FEI-ekzamenoj taksas aliajn fakojn rilate Esperanton. Pri movado, pri kulturo, pri historio. Estis planata sesio de la triagrada ekzameno (Atesto pri Supera Lernado) en novembro 2019, en Parizo, fine ĝi prokrastiĝis al januaro 2020 pro la transportaj strikoj.

La kvar legendaj libroj por tiu ekzameno estas:

▪ **Ne ekzistas verdaj steloj, de Liven Dek (60 mikronoveloj kun suplemento).**

El recenzo de Anna kaj Mati Pentus: **Malgranda aspekte, sed granda intelekto**

La libron *Ne ekzistas verdaj steloj* oni povas tralegi rapidege. Jes, la noveloj vere estas tre mallongaj, multaj okupas nur etan parton de paĝo, la tiparo de la libro estas granda, inter tekstoj troviĝas paĝoj malplenaj aŭ kun bildetoj. Do, oni bezonas nur kelkajn horojn por la legado. Sed la malgranda kvanto da teksto donas ampleksan motivaron por pensi kaj preparoli kun aliaj legantoj aŭ nelegantoj de la libro. (...) Amantoj de amhistorioj kaj detektivaj romanoj trovos en tiu ĉi libro etaĵojn de siaj ŝatataj ĝenroj. Estas kelkaj rakontetoj kun politika fono. Nur du-tri rilatas iamaniere al Esperanto. (...)

Pri la aŭtoro oni povas legi sur la kovrilpaĝo. Liven Dek estas plumnomo de Miguel Gutiérrez Adúriz, verkisto, eldonisto, tradukisto.

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8783#ek>



▪ **Viktimoj, de Julio Baghy.**

Klasika romano, kun streĉa intrigo pri amo kaj morto en siberia militkaptitejo. Mejlŝtono en la evoluo de la Esperanta prozo.

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3806>



El recenzo de Sten Johansson:

Julio Baghy pasigis ses jarojn kiel militkaptito en Rusio dum la unua mondmilito, revolucio kaj interna milito. Tie li komencis sian agadon kiel Esperanta instruanto kaj aktivulo. Tie evidente stariĝis en lia menso la bazaj homaj demandoj pri homeco, respondeco, malamo, venĝo ktp. El tiu periodo en grava parto de lia junaĝo fontas multaj liaj poemoj, noveloj kaj romanoj Esperantaj. Pro la pozicio de Baghy kiel "Paĉjo" de la tuta esperantistaro, tiu periodo, tiuj medioj kaj la vivkondiĉoj de tiuj militkaptitoj en Siberio iĝis fundamenta parto de la Esperanta literaturo.

Viktimoj estas la unua proza verko de Baghy, unuafoje publikigita en 1925. Ĝia strukturo estas ege teatra; efektive la romano konsistas el aro da scenoj kun tre malmulte da kunliga rakonta prozo.

▪ **La Zamenhof-strato, de Roman Dobrzyński**

Interparoloj kun la nepo de la kreinto de la lingvo Esperanto.

Recenzas Ulrich Lins:

La Majstro estas la plej konata Zamenhof. Sed pli videbla, ĉar reale ekzistanta, estas lia nepo, nome doktoro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, kiu preskaŭ regule partoprenas la Universalajn Kongresojn. Tiu ĉi libro unuafoje prezentas lian vivon. Roman Dobrzyński proksimigas lin al ni en la formo de intervjuo. Ili komencis interparoli en 1993 en Litovio, helpe de bongusta loka miel-likvoro. La rezulto estas ekscite interesa.

Vidu en LME 604 pri Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, *La rue Zamenhof*.



▪ **La bona lingvo, de Claude Piron**

Elokventa pledo por la riĉeco de la parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj.

La bona lingvo referencas samtempe la lingvon Esperanto mem, kaj ankaŭ la subjektivan perspektivon pri kiel la lingvo estu parolata, laŭ la aŭtoro. Li traktas Esperanton de pluraj facetoj kaj konklude deklaras sian preferon por originalaj kunmetaĵoj anstataŭ unuradikaj pruntvortoj. Tiel paroli, laŭ li, konsistigas "bonan" Esperanton. Kunmetado estas natura kvalito de aglutina lingvo kia Esperanto.

En la plej polemika parto de la libro la aŭtoro forte esprimas sian malŝaton de radikoj, kiujn li nomas neologismoj, sed inter kiuj, pluraj estas *novaj vortoj* laŭ la Zamenhofa difino. Tiusence, Piron proponas kontraŭfundamentan reformon al la lingvo. Li kritikas francojn pro tio, kion li perceptis esti ilia tendenco preferi pseŭdoprecizajn, intelektajn vortojn. Kontraste, li elmontras povon sin esprimi per baza vortprovizo kun imagema kunmetado. Piron postulas, ke estas eble esprimi eĉ la plej kompleksajn sentojn pere de simpla vortprovizo. La libro ne nur helpas klarigi la diversajn kriteriojn laŭ kiuj oni povas nomi Esperanton la "bona" lingvo, sed ĝi ankaŭ donas ian pli profundan rigardon al la maniero kiel esperantistoj povas enkonduki novajn vortojn en Esperanton.

(laŭ https://www.wikiwand.com/eo/La_Bona_Lingvo)

La libroj estas haveblaj ĉe la libroservo de Espéranto-France. Bonan legadon !



Claude Nourmont

Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento

Okaze de la 40-jara ekzisto de MONATO, kaj por memori sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita pro tiu ĉi celo, estos aljuĝata ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premio de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de MONATO.


Regularo

1. Povas partopreni ĉiu persono, kiu bone regas Esperanton kaj kiu ne verkis por MONATO en la lastaj kvin jaroj.
2. Por partopreni la kandidatoj sendu tekston de minimume 500 kaj maksimume 2500 vortoj al nova_talento@monato.be
3. La temoj inter kiuj la kandidatoj povas elekti estas:
 - La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia propra lando aŭ regiono
 - Ekonomio
 - Komputado
 - Scienco
 - Medio kaj ekologio
 - Lingvo
 Atentu, ke do Esperanto-movado ne estas inter la temoj. MONATO estas revuo en Esperanto, ne pri Esperanto.
4. La kontribuoj estu originale verkita por MONATO. Do ne estos akceptitaj tradukoj, nek artikoloj, kiuj jam aperis aliloke.
5. La aldono de fotoj al artikoloj estas rekomendata. Tiuj fotoj devas esti faritaj de la aŭtoro mem, aŭ almenaŭ li posedu la permeson publikigi ilin en MONATO. Se en la foto aperas personoj, li havu la permeson de tiuj personoj, por uzi la foton kune kun la artikolo, aŭ eventuale, permeson de la gepatroj, se en la foto aperas infanoj.
6. La uzon de pseŭdonimo MONATO permesas nur tre escepte, ekzemple por protekti personojn en totalismaj ŝtatoj.
7. Partoprenanto donas al la eldonanto la ekskluzivan eldonrajton de la tekstoj, kiujn ŝi/li havigas al MONATO por tiu ĉi konkurso. Tiuj rajtoj validas por la presita kaj la ciferecaj eldonoj de la revuo.
8. La redaktoroj decidis, surbaze de la lingva kaj ĵurnalisma talentoj de la aŭtoroj, kiuj artikoloj partoprenantaj en la konkurso aperos en MONATO. El tiuj la ĵurio, konsistanta el redaktoroj de MONATO kaj eksteruloj, elektos ĉiujare la dek plej bonajn kaj atribuos al iliaj aŭtoroj la premiojn.
9. Partoprenanto povas sendi plurajn kontribuojn, sed povas gajni nur unu premion. Kiu ne gajnis unu el la ĉefpremioj rajtas en la venonta jaro denove partopreni. Se ne estas sufiĉe da valoraj kontribuoj, povas esti malpli ol dek premioj.

Antaŭ ol ekverki, indas demandi ĉe nova_talento@monato.be, ĉu via temo taŭgas por la konkurso. Tie vi povas ricevi ankaŭ ĉiujn pliajn informojn. Kiu ne konas MONATOn povas de tie ĉi elŭti plurajn kompletajn numerojn.

Ĉu vi deziras iom informi pri tiu ĉi iniciato en via grupo aŭ dum iu renkontiĝo? Do presu tiun ĉi afiŝeton kaj distribu ĝin!

Fonto : https://www.monato.be/nova_talento.php



Paul Gubbins estis redaktoro de MONATO ekde 1993 kaj ĉefredaktoro de januaro 2011 ĝis lia morto en aŭgusto 2016. Pliajn detalojn pri lia vivo vi povas trovi en Vikipedio kaj en nekrologo verkita de la honora ĉefredaktoro de MONATO, Stefan Maul.

Ĉar tre multaj homoj en la mondo nun devas resti hejme pro la kronviruso, *Monato* regalias ilin per senpagaj ekzempleroj.

En <https://www.monato.be/pdf> vi povas trovi la tri plej freŝajn numerojn en la formoj PDF (por grandaj ekranoj) kaj en la dosierformoj ePub kaj Mobipocket (por poŝtelefonoj kaj librolegiloj).

Ni kaptas la okazon por danki ĉiujn fidelajn abonantojn, ĉar nur danke al ilia multjara abonado eblas disdoni la revuon nun.

Agrablan legadon!

Filmkonkurso "Mia asocio, mia urbo": rezultoj

En septembro 2019 UEA kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI) lanĉis la filmkonkurson "Mia asocio, mia urbo" por diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj, omaĝe al la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de ĈRI. Ĝis la jarfino de 2019 la konkurso sukcesis varbi 35 filmojn (inkluzive 11 filmetojn fare de ĈRI) pri 30 urboj kaj asocioj en 15 landoj en kvin kontinentoj. Ĉiuj estis publikigitaj en la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEA viva: <http://youtube.com/ueaviva>.

Danke al la konkursanoj la nombro da abonantoj en la kanalo rapide kreskis de ĉirkaŭ 700 ĝis 1100.

Laŭ decido de la juĝa komisiono UEA disdonos la premiojn al:

- 1-a loko: *Minga Guazú*, de Alexandra Mendieta (Paragvajo);
- 2-a loko: *Atlanto, Georgio*, de Alekso Miller (Usono);
- 3-a loko: *Taškento*, de Gafur Mirzo (Uzbekio).

Krom tio, la juĝa komisiono decidis ankaŭ pri premia distingo al:

- 4-a loko: *Svitavy*, de Daria Slonova (Ĉeĥio);
- 5-a loko: *Lausanne*, de François Randin (Svislando).

Ricevas honoran mencion la jenaj 8 filmoj:
Bujumbura, de Niyukuri Gilbert (Burundo);
Kalio, de Daniela Obando (Kolombio);
Liptovio, de Peter Rybín (Slovakio);
Parizo, de Vincent Jacques (Francio);
Partizánske, de Lea Pillot-Colin kaj Daria Slonova (Slovakio);
Querétaro, de Carlos Hernández Loarca (Meksiko);
San Briego, de Murielle Caré (Francio);
Verda Stacio, de Pavel Kašćák kaj Peter Baláž (Ĉeĥio/Slovakio).

La juĝa komisiono volas substreki la valoron de ĉiuj senditaj filmetoj. Ili montris sin vere valoraj iloj por prezenti la agadojn de esperantistoj tra la mondo.

Interesa artikolo kun intervjuo de iuj gajnintoj aperis en *Libera Folio*: <https://www.liberafolio.org/2020/03/11/esperantistoj-rakontas-pri-siaj-urboj-en-filmkonkurso-de-uea/>

Gratulojn al la premiitoj, honorigitoj kaj subvenciitoj! Koran dankon al ĉiuj partoprenintoj kaj aparte al Ĉina Radio Internacia pro la afabla kunlaboro por sukcesigi la konkurson.

fonto: GK N-ro 851 (2020-02-28) uea.org/gk/851a1

LITERATURAJ KONKURSOJ

Internacia Esperanta literatura konkurso ABRITUS



La Esperantista Domo de Kulturo "D-ro Ivan Kirĉev" (Razgrad, Bulgario) ankaŭ en 2020 anoncas la tradicion Internacian literaturan konkurson ABRITUS por originala Esperanta poezio kaj humuro. La sendotaj verkoj devas esti komputile skribitaj kaj subskribitaj per pseŭdonimo. Ili devas esti ne publikigitaj pli frue.

Bonvolu uzi niajn retadresojn:

esperanto_razgrad@mail.bg,

dkateva@mail.bg (por sendi la konkursaĵojn)

kaj ekra_razgrad@mail.bg (por klarigo de la pseŭdonimo, vera nomo kaj poŝtadreso).

La limdato estas la 5a de junio 2020. La rezultoj estos anoncigitaj dum la tradicia festo EKRA-2020, okazonta la 12-14an de junio

Fonto: *La Ondo de Esperanto*
<https://sezonoj.ru/2020/02/konkurso-9>

Literatura konkurso "Ĥristo Gorov - Ĥrima 2020"

Ĥristo Gorov (Ĥrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto.

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas **Internacian Esperantan Literaturan Konkurson**. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.



La konkurso estos por rakonto kaj eseo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu la Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj; formato A4; tiparo Times New Roman (12 punktoj). La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30a de septembro 2020 rete al modest@abv.bg aŭ poŝte al:

Georgi Mihalkov, Sofio – 1229,

"Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33,

Bulgario.

Fonto: *La Ondo de Esperanto*
<https://sezonoj.ru/2020/03/konkurso-11>

Per biciklo ĉirkaŭ la mondo

418 tagojn mi vagabondis tra sud-orienta Eŭropo, Turkio, Irano, la arabajn emirlandojn (UAE), Omano, Barato, Nepalo kaj sud-orienta Azio. Mi dormis preskaŭ ĉiun tagon en malsama loko, vidis 23 landojn kaj finfine biciklis 22.503 kilometrojn.

Sed ekde la komenco. Post kelkaj semajnoj da planado, la 1an de julio 2018 mi adiaŭis miajn familianojn, geamikojn kaj najbarojn en Waltrop, sidiĝis sur la biciklo kaj ekis sud-orienten.

Ĉu Honkongo, Bankoko aŭ Singapuro — la celon mi ne fiksis. En Hanojo, Vjetnamio, mi finfine alvenis. “Nu, kiel estis?” mia fratino ŝerce demandis kiam mi ruliĝis sur la hejman korton, bone sciante ke simple ne eblas konkludi 14 monatojn kaj pli ol 22.000 kilometrojn

en manpleno da frazoj. Estas la amaso da renkontoj kun gastigemaj homoj, kiuj sen hezito donis al mi manĝon, tendumlokon aŭ eĉ liton malplenan, kiel la barata motorrikiŝo-ŝoforo, kiu invitis min al vespermanĝo, nesciante, ke fakte estas mia naskiĝtago. Pli ĝenerale la manĝaĵoj. Sur mia telero troviĝis unu aŭ alia koleoptero aŭ tripaĵo, sed kion oni ne faras por ne ofendi sian gastiganton...

Mi tamen, krom du- aŭ trifoja malvarmumo, neniam serioze malsaniĝis, nek estis envolvita en trafik-akcidento, kio al mi preskaŭ egalas al miraklo. Ankaŭ la biciklo bone travivis la vojaĝon. La pneŭoj kelkfoje perdis sian aeron, sed tio estis ĉio.

Kiun efikon havas tiom longa periodo en soleco kaj fremdeco; tiom da travivaĵoj? Miaj geamikoj opinias, ke mi ŝajnas pli matura ol antaŭe. Mi mem ĉiam diras, ke mi fariĝis pli trankvila, sed miaj konatoj

devas rideti pri tio, ĉar mi ja jam antaŭe ne estis la plej laŭta, plej perturbema homo.

Sed mia mondrigardo ja iom ŝanĝiĝis. Vidinte la malriĉecon en la mondo, la por ni apenaŭ imageblajn vivcirkonstancojn, kiuj estas la ĉiutaga realo en iuj regionoj de la mondo kaj la malliberecon sperteblan en landoj kun subprema registaro aŭ kulturo, niaj problemetoj ne plu ŝajnas tiom gravaj. Impresis min ankaŭ, ke ofte la homoj en la plej malriĉaj landoj estas la plej ridemaj. “Kio plej plaĉis al vi dum la vojaĝo” oni ofte demandas min. Kompreneble malfacilas elekti unu aferon tian, sed certe estas, ke mi enamiĝis al la dezerto. La noktoj solaj en plena silento sen ajna bato de flugilo birda aŭ insekta, sen ajna spiro de vento sub steloplana ĉielo — tiaj memoroj ankoraŭ plenigas min per feliĉo. Aŭ la nenombreblaj fojoj, kiam min invitis tute fremdaj homoj. Tio okazis aparte ofte en Irano.



Antaŭ la turo Azadi en Teherano, Irano (2018)

Unu vesperon homoj en aŭto haltigis min demandante, ĉu mi dezirus tranokti ĉe ili. Mi akceptis, ili markis sian loĝejon sur mia mapo kaj foriris. Sur la vojo alia aŭto haltis kaj ankaŭ ili invitis min. Mi dankeme klarigis, ke mi jam havas lokon, sed ili insistis, ke ili almenaŭ eskortu min tra la trafiko al la urbo. En la urbo mi iris al la markita loko, kaj viro tuj signis al mi eniri lian domon. Bone! Sed mi ja rimarkis, ke la homoj aspektas alie kaj evidentiĝis, ke ili tute ne rilatas al la homoj en la aŭto. Vere estis tria familio, kiu simple forprenis min de la strato!

En la fino, de Hanojo mi uzis aviadilon reen al Istanbul kaj daŭrigis Slovakien, kie tiam okazis la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La lastajn esperantistojn mi renkontintis en Budapeŝto, do estis granda ĝojo, ke jam antaŭ la renkontiĝo venis du esperantistoj kun siaj bicikloj el Rumanio por akompani min kelkajn tagojn.

Tio estis la lasta halto antaŭ reveni al mia hejmo. Kaj nun? Nun mi prioritigas miajn studojn (mensa laboro mankis al mi), sed la venontaj biciklo-vojaĝoj estas jam planataj!

Jan

Pri la aŭtoro

Mi naskiĝis en 1998 en Steinfurt sed plenkreskiĝis en Waltrop, Germanio. Post ricevo de la Realschul-diplomo en 2014 mi fariĝis interŝanĝa studento kaj vivis unu jaron en Ohio, Usono. En 2015 mi komencis kaj abiturientajn studojn kaj la lernadon de Esperanto, kaj vizitis mian unuan Esperanto-renkontiĝon (IJK en Wiesbaden). En 2018 mi ricevis, kun laŭdoj, mian abiturientan diplomon. Tuj poste mi ekbiciklis de mia hejmo orienten. Tiu vojaĝo daŭrontis preskaŭ 14 monatojn. Nun mi finfine denove estas hejme kaj staras ĉe la komenco de studado pri matematiko ĉe la universitato de Münster. Krom matematiko kaj biciklado, mi okupiĝas pri lingvolernado, legado kaj komputilumado.



Suprenbiciklanta krutan straton estas ankaŭ en Omano (2019) (foto: Jan Raring)



dezerto en Omano (2019)

Espéranto-France vous invite à son Assemblée générale

le samedi 13 juin 2020, à 14h30

L'assemblée générale aura lieu de 15h à 17h
et sera suivie d'un apéritif

MVAC Marais, salles 1 et 2
5, rue Perrée 75003 Paris

Les adhérents recevront une invitation par courrier dans
les délais prévus par les statuts.
Toutes les informations concernant l'AG seront mises en
ligne sur le site Internet d'Espéranto-France
<https://esperanto-france.org>

